# kontakto




N-ro 3, Volumo 7/1970

# Kontakto revuo de TEJO

**Redaktoroj**
Ulrich Lins
Simo Milojevic
Hans Zeilinger

**Adreso de la redakcio :** Hans Zeilinger Gobelslehenstr. 1, D-87 Wurzburg, FR Germanio.

**Administrejo,** al kiu oni sendu ĉiujn abonkotizojn, reklamojn ktp. : KONTAKTO, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.
Banko : Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1. Poŝtĉekkonto : 378964.

**Presisto :** Drukkerij De Kennemer, Wijkerstraatweg 178, Velsen-Noord, post Beverwijk, Nederlando.

**MANUSKRIPTOJN POR KONTAKTO** oni sendu al la redaktoro en du ekzempleroj; ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto, ĉiuj supersignoj devas aperi laŭ ĝusta formo, se necese enskribitaj permane. Oni skribu sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj granda maldekstra marĝeno. Manuskriptojn nepetitajn la redaktoro ne devas resendi. Li havas la rajton laŭ sia bontrovo modifi artikolojn Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la subskribintoj mem, kies opinioj ne nepre akordiĝas kun opinioj aŭ principoj de TEJO kaj de la redakcio.

**Abonprezo :** 8 ned.gld. jare (por gejunuloj ĝis inkl. 25 j. 5 ned. gld.) - Kun la revuo „Esperanto" kaj la Jarlibro de UFA : 22,50 ned.gld (gejunuloj) ĝis inkl. 21 j.) resp. 30 ned.gld. (ĝis inkl. 25 j.) - Kun la bulteno „Novaĵoj" de TEJO : minimume 16 nedgld. (Patronaj Membroj.)

**Individua numero :** 2,20 ned.gld.

**Rekramtarifo :** 200 ned. gld. por tuta paĝo. Rabato por esperantistaj) entreprenoj.

# Junulara asembleo

Okaze de sia arĝenta jubileo, Unuiĝintaj Nacioj volis, ke unuiĝu en Novjorko la junularo de ĉiuj nacioj.

Sub la ĝenerala temo „Paco kaj progreso" kunvenis en julio pli ol 600 delegitoj, pli-malpli junaj, el ĉ. 110 landoj. Kiu atendis de tiu Monda Junulara Asembleo freŝajn impulsojn por la laboro de UN, devis rapide seniluziiĝi : Eĉ fina rezolucio de la komisiono pri paco ne efektiviĝis, ĉar precipe okcidentaj delegitoj riproĉis al ties gvidantoj manipuladon kaj subpremon de la parola libereco; la komisiono per plimulto kondamnis la reĝimojn en Hispanio, Portugalio kaj Greklando, nomis Brition, FR Germanion, Francion kaj Japanion imperiismaj ŝtatoj kaj pledis por membreco de GDR en UN. Aliaj komisionoj rezoluciis por memkompreneblaĵoj : ke la registaroj disponigu la plej grandan parton de elspezoj antaŭviditaj por armado cele al la edukado de la triamonda junularo, ke terposedaĵoj estu naciigitaj, ke registaroj kontrolu eksterlandajn entreprenojn, kaj fine ankaŭ por ĝenerala disvastigo de kontraŭkoncipiloj.
En la ferma kunsido U Thant transdonis sian dankon, petante la mondan junularon pri ĝia aktiva kunlaboro por la certigo de paco kaj progreso. Ne tre pace, sed en preskaŭ tumultaj cirkonstancoj finiĝis la Asembleo, kiu sukcesis transdoni al la aŭtuna UN-sesio ankoraŭ jenajn proponojn : por la retiriĝo de sovetaj trupoj el Ĉeĥoslovakio kaj de usonaj el Hindoĉinio, por la fondiĝo de demokrata ŝtato Palestino kaj por okazigo de la Monda Junulara Asembleo en ĉiu dua jaro.
Ne reprezentita en la kunveno estis la junularo de Ĉinio . . .

# Pardonu, s-ro

En „Kontakto" n-ro 2/70 sur la paĝoj 16-17 aperis prozaĵo sub la titolo ELASTA KORO, sed indiko pri la nomo de aŭtoro. La aŭtoro de la prozaĵo, cetere premiita siatempe en la Belartaj Konkursoj de UEA, estas s-ro TIBOR SEKELJ. Ni afable petas pri pardono pro la eraro de la presejo, kiu sampaĝe forgesis ankaŭ du desegnaĵojn.

# Estraro de TEJO

**Humphrey Tonkin,** prezidanto, 35 Violet Lane, LANSDOWNE, Pa. 19050, Usono
**Senad Čolic,** ĝenerala sekretario, Halilbaŝica 23, SARAJEVO, Jugoslavio.
**Hans Eichorn,** vicprezidanto, Rosenfelderstr. 2a, DDR-113 BERLIN, GDR.
Jeanne-Marie Liouville, vicprezidantino, p/a H. Bakker, Kastelenstraat 231, AMSTERDAM-Z., Nederlando.
**Hans Eichhorn,** vicprezidanto, Astronomisches Institut, Ruhr-Universitat, D-463 BOCHUM, FR Germanio.
**Ulla Luin,** kasistino, Myggdalsvagen 123, S-13500 TYRESO, Svedio.
**Renato Corsetti,** vicsekretario, Via Strabone 1, 00176 ROMA, Italio.
**Marek Lassak,** membro, Rondo de Esperantistoj, Universitato N. Kopernik, Mickiewicza 6/10, TORUN Pollando.
**Uwe Joachim Moritz,** membro, Andreasstr. 57, D-5161 MERKEN, FR Germanio

# Landaj sekcioj

**Argentino :** C. C. 64, San Martin de los Andes, Neuquen.
**Aŭstralio :** I. Heldzingen, Lot 7 Marville Court, Boronia 3155 Vic.
**Aŭstrio :** H. Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010 Graz.
**Belgio :** P. Peeraerts, Drakenhoflaan 97. Deurne-Antwerpen.
**Brazilo :** Caixa Postal 18-ZC 00, Rio de Janeiro.
**Britio :** M. Reed, MAP, University of East Anglia, Norwich NOR 88C.
**Bulgario :** p.k. 66, Sofia.
**Francio :** JEFO, 34 rue de Chabrol, Paris X
**Germanio :** Postafch 2113, D-85 Nurnberg 2.
**Grekio :** Agiu Meletiu 54 (814) Athinai.
**Hispanio :** S. Aragay, Bassegoda 40-3-1, Barcelona 14.
**Hungario :** Kenyérmezo. u. 6, Budapest VIII.
**Italio :** Via Po, 7 I-10124 Torino.
**Japanio :** Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, Tokyo.
**Jugoslavio :** Amruŝeva 5/1 Zagreb.
**Koreo :** Internacia P.O. Kesto 1232, Seoul.
**Madagaskaro :** B.P. 1399, Tananarive.
**Nederlando :** G. Peet, Van Linschotenlaan 306, Hilversum.
**Novzelando :** P.O. Box 40-181, Upper Hutt.
**Pollando :** Jasna 6, Warszawa 1.
**Svedio :** T. Janssen, Bjassevagen 1 B, S-71200 Hallefors.
**Svislando :** N. Margot, Ch. des Lys 4, 1010 Lausanne.
**Usono :** 4 Central Street, Millers Falls, Mass. 01349.

D-RO I. SZERDAHELYI :

# TEJO audace pri aktuala temo

**En la lastaj jaroj en diversaj universitatoj (Okcident-Berlino, Grand-Britujo, Italio, Francio, Japanio ktp.) la studentaj movadoj pliakriĝis, kelkfoje jam minacis la sociordon per vere revoluciaj okazintaĵoj. Daniel Cohn-Bendit, la estro de la Pariza student-ribelo nomis „ludo" la revolucian batalon. Tiu „ludo" estis dufaceta : kerne motivita per la malkontenteco pri la universitataj sistemoj - aliflanke malkontenteco pri la establita sociordo. La „revolucia-ludo" ne povis atingi la nivelon de „revolucia-batalo", tamen elperfortis kelkajn, sufiĉe gravajn rezultojn : La plej granda sukceso de la studentaj movadoj estis, ke ili ĉesigis la ĝistiaman ne-politikecon de la universitata junularo, atentigis la junan intelektularon pri la antagonismoj de la sociordo kaj rivelis la mankojn de la universitataj sistemoj: la universitatoj ne plu povas esti tiaj, kiaj estis antaŭ jaroj. Malgraŭ la atingitaj rezultoj la metodoj aplikitaj ne estas senmanke akcepteblaj : kelkfoje ili plie diskreditis seriozajn ideojn anstataŭ popularigi ilin.**

**La esperantista junularo ne povis resti ekster la influo de la ĝeneralaj junularaj agadoj. Dum la 25-a IJK en TYRESO, laŭ la akceptita Deklaracio ĝi fiksis sian socian profilon. Dum la 26-a IJK - TEJO transiris al la paralela problemaro : al la rilato LERNEJO - JUNULARO.**

## ĈU REVOLUCIO ?

La lernejo estas socia ĉelo, viva kaj funkcianta elemento en la socia plasmo, spiranta kaj pulsanta kune kun la socio mem. Sekve : kune kun la socio devas evolui aŭ stagni ankaŭ la lernejo. Ŝanĝi la socion signifas ŝanĝi ankaŭ la lernejan sistemon. La ŝanĝoj estas evoluciaj kaj revoluciaj. Sed : ĉu revolucio potencie enhavas la ideon de la detruo kaj perforto ? Ĉu la kvanta pliampleksigo de evoluciaj elementoj sur certa pinto ne transsaltas en revolucian staton ?

Oni parolas pri teknika revolucio kaj ĝia konsekvenco - la eksplodo de la studmaterialo : la teknika revolucio enpenetras en la lernejojn kaj ankaŭ tie ekflagrigas la revolucion : en tia senco fariĝas la lernejo - EJO de la REVOLUCIO ! Ĝi devas elformi en siaj disĉiploj la kapablon vivi kaj transvivi tiun revolucion, eĉ pli : fariĝi la avangardo de la revolucio mem !

NOTO : dum la diskuto reliefiĝis du opinioj : la perforta ŝanĝo de la sociordo kun posta detruo kaj rekonstruo de nova lernejo - kaj : la abrupta, „revolucia" reformo de la lernejsistemo laŭ la postuloj de la socia evolunivelo.

## ĈU EDUKEJO ?

Sed : kion signifas EDUKi ?

Laŭ Plena Vortaro :

1 Direkti la elvolviĝon de fizikaj, moralaj kaj intelektaj kapabloj de infano aŭ junulo . . .

2 Dresi beston . . .

3 Instrui iun pri la manieroj kaj kutimoj de ĝentileco kaj dececo . . .

-ISTO. Homo, kiu profesie edukas infanojn aŭ junulojn aŭ bestojn.

Konsiderante, ke PV ne estas fakvortaro - tamen, tiu ĉi difino lamas. Ni eltiru nur unu elementon: KAPABLO - ne nur ! Sed ankaŭ: ecoj, proprecoj, kvalitoj, karaktero, kono, scio ktp., ktp.

Por EDUKi la PV denombras sinonimojn : zorgi, varti, kulturi, disciplini, guverni, instrui. Aldoninte la du sinonimojn, troviĝantajn ĉe -ISTO : mentori, dresi. La seminario, gvidata de F. Simonnet faris interesan paralelon : kiomprocente enestas ĉi elementoj en la nuna kaj kiom ili devas enesti laŭ la junularo :

NUN : EDUKI= zorgi 13% + varti 18% + kulturi 21% + disciplini 37% + instrui 26% + mentori 19% + dresi 21%.


PLANITA : zorgi 34% + varti 19% + kulturi 53% + disciplini 25% + instrui 56% + mentori 25% + dresi 1%.

La edukado estas reciproka, du-subjekta aktiveco (edukanto-edukato : ambaŭ aktivaj) reciproke influantaj kaj influataj. La eduka sistemo, fiksita laŭ certa kulturpolitika koncepto realiĝas dum la instrueduka procezo inter du polusoj : la deiro kaj la celo. La celo, fiksita de la ŝtata kulturpolitiko estas ĝenerala kaj statika. Sed celojn havas kaj la instruanto kaj la instruato (edukanto resp. edukato) : la tri celoj povas adekvati, simili aŭ



konflikti : la fiksitan idealon povas akcepti aŭ malaprobi kaj la edukanto kaj la edukato. En tiu karambolo ludas gravan rolon ankaŭ la eksterlernejaj medioj (familio, amikoj, televido kaj radio, kino, ĵurnaloj kaj revuoj ktp.).


Deiro (fakto)



instrueduka procezo — celo — statika / dinamika

Ju pli alta estas la lerneja grado, des malpli grandan edukan influon havas la lernejo.

Elementa
Meza
Supera



Proporcio de instru- kaj edukelementoj

La malharmonio inter la diversaj medioj efikantaj sur la personecan elformiĝon de la junulo kondukas al internaj - poste al eksteraj konfliktoj de la junularo.

**ĈU SELEKTEJO ?**

La kvanto de lernejaj benkoj devas esti egalaj al la kvanto de gejunuloj, dezirantaj lerni. Tiu postulo efektiviĝas nur sur la baza nivelo. Ĉar poste, inter tiuj du kvantoj ekestas diverĝeco, okazas la selektado de la junularo : parto daŭrigas la lernadon, alia parto ne. La gejunuloj jam post la elementa lernejo disgrupiĝas jene :

ĝeneralaj mezlernejoj
specialaj mezlernejoj
metilernejoj
sen-lernejanoj

La dua, pli forta selektado okazas post la fino de la mezlernejo : se, ekz., la elementan lernejon finis 100% de la junularo, la mezan lernejon jam nur 50% - kaj la superan nur 10 -20% de la junularo.

Se la lernejo senmanke plenumas sian celon kaj determinas decide la personecon de la absolvinto, laŭ tiuj kategorioj diferenciĝas ne nur la plenumotaj laborpostenoj en la socia vivo sed ankaŭ la kvanto de konoj kaj kapabloj : intelektaj, psikaj kaj moralaj. Ĉu ankaŭ la kvalitoj ?

NOTO : Dum la diskutoj evidentiĝis, ke la problemo diversmaniere prezentiĝas laŭ diversaj lernejaj sistemoj. En kelkaj - la selektado estas organizata kaj direktata, en aliaj - spontanea. En tiu ĉi lasta kazo praktike ĉiu junulo havas okazon studi sur ĉiu nivelo sed la socio ne garantias ilian okupigon. En la organizata selektado la principoj de selektado estas la plej diversaj : ĉefe oni priatentas la inklinon kaj kapablojn de la kandidatoj.

SELEKTADO okazas ankaŭ inter la unuopaj lernantoj en la klasoj. Laŭ tiu selektado ni markas la lernantojn per diversaj „titoloj". eminenta, bona, meza.... La formo estas la klasifikaĵo. Tiu elemento kaŭzas en la instru-eduka laboro tutan sistemon de konfliktoj :

inter lernanto kaj lernanto
lernantoj kaj instruistoj
lernantoj kaj gepatroj
gepatroj kaj instruistoj
gepatroj kaj gepatroj ks.
-ni povus daŭrigi !

Aliflanke - la skalo de klasifikaĵoj tute kongruas al la hodiaŭa, kelkfoje jam freneza konkurspirito : oni aranĝas konkurojn kaj konkursojn en la plej neeblaj kaj stultaj situacioj (milde nomata „sportspirito").
Ĉu tiu spirito de venkemo, elstaremo, distingiĝemo en si mem ne ekscitas la selektademon ?
Tamen : La klasifikado estas ne nur selektilo sed ankaŭ pritaksilo kaj rekompenco. Almenaŭ, ĝi devus esti objektiva kaj reala pritaksilo kaj rekompenco kaj nepre ne donaco aŭ puno.


NOTO : La diskutgrupoj ne tuŝis tiun ĉi problemon. Verŝajne ili opiniis: ĝis kam oni ne inventos pli bonan sistemon, la nunan sistemon oni devas konservi. Ĉu ?

**ĈU PREPAREJO ?**

Jes, nepre. Ĉiu lernejo en si mem ĉiam estas preparejo. Sed : kiujn preparas al kio aŭ por kio ? Estus komplike respondi. Nun ni limigas la demandon :

**ĈU AL DEMOKRATIO ?**

Demokratia estus tiu lernejo, en kies edukado estas la plej fortaj la sendistinge egaligaj tendencoj.
Kiel ni vidis : la elektado jam en si mem estas distingado. Kaj kion signifas distingi ? Diferencigi, apartigi, kontrastigi, marki, signi, karakterizi - ĉiuj ĉi fenomenoj enestas en la nuntempa lernejo.
Konfliktas du ekstremaj tendencoj :
egaliga - tendencas al anarkio.
distingiga - tendencas al aristokratismo.
Verŝajne la proporcia mezo estus la solvo. Sed la elemento en tiu procezo estas nepre la interrilato EDUKANTO - EDUKATO. Se ili estas kunlaborantoj en harmonia spirito - la problemo nepre estas solvebla.
Sed kiuj estas la normoj de tiu novspirita interrilato ?



**Kiajn fakulojn preparas la hodiaŭa universitato?**
**Ĝiaj pretendoj kaj rezultoj ofte diverĝas senespere. Post la studoj la junaj homoj fruntbatas la realon. Ĉu finfine necesas miri, ke la universitatanoj lastatempe ribele postulas ŝanĝojn.**

## I FAKTOJ

1 Antaŭ kelkaj jardekoj en la cerboj de avoj estis la sama, kiel en la cerboj de nepoj; hieraŭ, en la serboj de patroj kaj filoj. Sed morgaŭ ?

2 Hodiaŭ : la homo dum sia vivofazo travivas tiom da ŝanĝoj, kiom en la antikva Mez-Oriento travivis nur 100 sinsekvaj generacioj.

3 El ĉiuj sciencistoj, vivintaj aŭ vivantaj ek de la komenco de la homara kulturhistorio 90% vivas en niaj tagoj.

4 La kvanto de scienca materialo dum 10 jaroj duobliĝis.

5 La granda parto de hodiaŭa studmaterialo post 10 jaroj arkaikiĝos, malaktualiĝos.

## II POSTULOJ

1 „La morgaŭo estos tia, kia estas la hodiaŭa lernejo" (prof. Szentgyorgyi).

2 Ni devas tiel eduki kaj instrui, ke la disĉiplo scipovu kaj kapablu alian, ol ni scipovas kaj kapablas.

3 La lernejo devas elformi en studentoj la kapablon transvivi la revolucion - eĉ pli : fariĝi la antaŭenigantoj de tiu revolucio.

4 „La lernanto ne estas ujo, kiun oni devas plenigi, sed torĉo, kiun oni devas flarigo (Tamm).

5 En la pasinteco : la pedagogio kaj instruado trene rampis post la ĝenerala evoluado; hodiaŭ ĝi devas antaŭi ĝin.

## III SOLVOJ

1 La lernejo donu vast-perspektivan bazkonon, elformu elastan pensmanieron.

2 Anstataŭ datoj, nomoj, reguloj, indikoj - elformu la kapablon distingi, logike pensi, ekrimarki la esencon malantaŭ la supraĵo.

3 La homa cerbo ne taŭgas por stokigi kaj konservi informaĵamason. Sed kapablas uzi la diversajn informaĵ-konservejojn, kies skalo kaj dimensioj ĉiam plivastiĝas.

4 Science ellaborenda plano por koncentrado kaj profitigo de kapacitoj, esploro de inter-influoj kaj tempe harmonia interakordo de la studmaterialo.

5 La respondeco kaj stato de pedagogoj :

a) Libereco al instruanto - libereco al lernantoj = adekvatas!

b) Novstila interrilato kaj kunlaborado inter instruantoj kaj instruatoj.

c) „La tempo kuregas. En nia kapturnige belega epoko la instruistoj, profesoroj staras sur la plej gravaj postenoj. La lernolibro ŝanĝiĝas en ĉiuj 5 jaroj. Ĉiuj povas postresti, nur la pedagogoj neniam ! De ilia laboro dependas, kia estos post kelkaj jardekoj de vivnivelo. De ili dependas kia estos la aĉetvaloro de nia pensio. Sian propran estontecon fuŝas tiu socio, kiu ŝparas je pedagogoj!" (prof. Gy. Marx, Budapest).

NOTO : Dum la diskuto la partoprenintoj kaptis precipe du elementojn el la temaro : la antaŭpreparo de pedagogoj kaj la teknikaj solvoj de la problemo.

a) El la alparoloj evidentiĝis, ke la nuntempa sistemo de de elektado kaj formado de estontaj pedagogoj arkaikiĝis kaj tute ne taŭgas por absolvigi altkvalitajn instruontojn kaj edukontojn.

Kritikante la ĝeneralan universitatan programon, oni

konstatis, ke la materialo ofte ne estas aktuala, sekvas la sciencan evoluadon nek en la materialo nek en la metodo. La prelegoj estas enuaj „laŭtlegoj", la tuta procezo havas ian karakteron de seka sciencumado.
Akcentite prezentiĝas tiuj mankoj en la preparo de pedagogoj : la universitato eĉ rezignas pri ilia pedagogia, didaktika kaj metodika preparo. Ĉi objektoj estas tute neglektataj, subnivelaj kompare al la „fak-objektoj" (ekz. lingvo, historio, geografio, matematiko ktp.). Tiuj mankoj pli akcentite prezentiĝas, se temas pri la novstila, moderna instruado kaj edukado. La universitatoj preteratentas la novajn postulojn, ili mem ne okupiĝas pri la ekzaktigo kaj teknikigo de la instru-eduka procezo.

b) La akceliĝanta tempo kaj teknika evoluo postulas ne nur la raciigon de la studmaterialo sed ĝian ekzaktan mezuradon, kvazaŭ logaritmigon. Iom post iom la maŝinoj transprenos multajn taskojn de la pedagogo, liberigos lin kaj la tiel ŝparitan tempon la edukisto povos eluzi por pli intensive eduki.
Kvankam nuntempe pri la ĝeneraligo de teknikaj instalaĵoj estus tro frue paroli, tamen, en la perspektiva planado ni devas observi la fakton de ilia iom post ioma disvastiĝo kaj ampleksa apliko.

## LA LINGVA PROBLEMO EN LA PERSPEKTIVO DE LERNEJA SISTEMO

Kiel vidite, la rapidege kreskanta amplekso de studmaterialo postulas urĝegan solvon. La kvanto de studmaterialo havas siajn naturajn limojn (lernotempo, akcepto-kapablo de lernantoj ktp.) Konsiderante la momentan situacion, la kvanto ne estas ampleksigebla.
Solveblecoj :

a) plialtigo de la nombro de lernejaj jaroj - signifus sidigi la gejunulojn en la lernejajn benkojn en tiu aĝo kaj vivperiodo, kiam ili estas la plej inventemaj kaj verkemaj;
b) apliko de modernaj teknikaj instruhelpiloj - vere ŝparus multan tempon, sed ilia ĝenerala apliko ne estas imagebla dum la sekvaj jardekoj pro teknikaj, financaj ktp. kialoj;
c) la raciigo kaj logaritmigo de la studmaterialo (la t.n. „instruminimumoj") plifaciligas la procezon, sed la tempo-ŝparo ne estas signifa.

Resumo : la a-c punktoj ne solvas radike la problemon.
Oni devas serĉi iun alian, pli alireblan kaj jam nun efektivigeblan solvon por liberigi tempon.
En ĉiu lernej-sistemo enestas ia fremda lingvo (last-tempe, sekve de lerta lingvo-imperiisma politiko - la angla lingvo, krome la aliaj, t.n. grandaj lingvoj : franca, germana, hispana, rusa). La fremda lingvo - kies praktika apliko, la parolo, estas sistemo de kapabloj, postulas ne tiom da intelekta energio kiom grandan tempo-investadon. La kvanto de investita tempo tute ne proporcias al la atingitaj rezultoj, ĉar :

a) estas nereale difinita celo alproprigi komplikan fremdlingvan sistemon kaj la kapablon ĝin uzi en la 2-3 horaj lernejaj kursoj. Se oni tion promesas, tutsimple oni mensogas !
b) oni kripligas psike kaj nerve la lernantojn, suferigante ilin dum longaj jaroj, katenante ilin en streĉeco dum multcentoj da studhoroj kaj ĉiuokaze skurĝante ilin per la dolora sento de nesukceso kaj fiasko;
c) oni forrabas de la junularo valoregan tempon, kiun ĝi povus eluzi multe pli efike kaj rezulte en la lernado kaj alproprigo de aliaj, multe pli urĝe bezonaj konoj kaj kapabloj.

La plej simpla kaj tuj efektivigebla solvo estus enkonduki unuece anstataŭ ĉiuj aliaj fremdaj lingvoj la Internacian Lingvon : ĝi estas la unusola lingvo, kiun oni povas perfekte alproprigi dum mallonga tempo en la lernejaj cirkonstancoj. Tamen, kiel transira solvo oni proponas la enkondukon de Esperanto kiel ponto-lingvo inter la gepatra kaj la posta fremda lingvo.

La enkonduko de Esperanto en la lernejajn sistemojn:


a) alportus novan nuancon en la eduka procezo : estante neŭtrala ekskluzive ĝi taŭgas al la edukado al internacia interkompreno, al la kultura interŝanĝo egalrajta, sen altrudi ian nacian pensmanieron aŭ demonstri ian nacian superecon;
b) La didaktika valoro de Esperanto montriĝus en la klara lingvistika koncepto de la lernantoj, surbaze de kiu oni multe pli facile povus instrui (transire) la duan fremdan lingvon.
c) La praktika uzebleco de Esperanto kreiĝus iom post iom, post la ĝenerala lerneja instruado. Kiam ĝeneraliĝos la praktika uzebleco de la Internacia Lingvo oni tute simple povos eksigi la instruadon de aliaj fremdaj lingvoj. En tiu kazo liberiĝos multaj horoj por aliaj pli valoraj celoj, la lernado de fremda lingvo ne plu estos senĝoja, sensukcesa penado sed rezulta, praktike valora kaj tuj uzebla aktiveco. Per la ekskluziva instruado de Esperanto, kiel fremda lingvo, oni eliminus el la lernejaj sistemoj doloran ulceron kaj oni kreus en ĝi sanan, progresivan, novan atmosferon.

**RESUMO : TEJO iom aŭdace sed vere aktuale elektis la diskuttemon. La problemo estas kompleksega. Ne estas, do, mirinde, ke ofte oni nur lanĉis la demandojn, eble oni diskutis pri ili sen formuligo de ia decido aŭ solvo. Ankaŭ la sumigo estas plie demando- ol respondo-karaktera. Sed krom la ĉ 150 kongresanoj, TEJO havas multe pli da membroj. Eble troviĝos (kaj oni povas esperi, ke jes) gejunuloj, kiuj povos aldoni novajn pensojn, novajn sugestojn, proponojn - eble eĉ respondojn al la malfermite restintaj temoj.**

**D-ro I. SZERDAHELYI**

**R. LLOANCY :**

# Unu jaron post Tyresö



Ĉi tie naskiĝis la Deklaracio.

Oni ne povas dubi ke, inter la 24a kaj la 26a, ekestis nova stilo rilate la etoson en la IJK de TEJO. Tiuj kiuj ne ĉeestis la 25an sentas ke io neordinara naskiĝis, kiun oni certe ŝuldas al la tiel nomata „Deklaracio de Tyreso". Baza dokumento pene ellaborita dum la kvaronjarcenta' jubileo en la sveda urbeto.

Kiel kelkdeko da linioj povas orienti la marŝon de movado, kiu, laŭ strukturo kaj rekrutigo, estas esence internacia ? Sendube la vortumo de la Deklaracio venis post longa maturiĝo de la ideoj, kaj post kreskanta bezono je malfermiĝo al la ekstera mondo. Pro tio, tiu dokumento ne nur signas novan vojon, sed ankaŭ resumas historian evoluon devigan en junulara movado.

En Graz, la diskutoj ĉirkaŭ la Deklaracio ĝenerale ne temis pri ties akcepto aŭ aprobo - kio ja estus ekstempa - sed pri apliko kaj baza ellaboro. Tiun taskon ricevis unu el la kvar komisionoj starigitaj dum la kunsidoj de la Komitato. Verdire la tasko ne estis facila, precipe ĉar la komisionanoj devenis de tre malsimilaj horizontoj kaj sekve, eĉ se ili opiniis paroli pri samaj objektoj, iliaj konceptoj ofte estis kontraŭaj. Unuj akcentis, ke multaj volas subfosi la Deklaracion donante al ĝi tre limigitan agadkampon nur lingvan kaj kulturan : aliaj argumentis, dirante ke alpreno de pure politikaj starpunktoj signifos, en pli-malpli longa estonteco, la mortigon de TEJO kiel internacia junulara forumo; kelkaj, inter la du ekstremoj, klopodis trovi taŭgan kompromison, kiu, ĉar kompromiso, ĉiujn malkontentigos.

Post longa debato, eĉ sur herbejoj dum la tuttaga ekskurso, la komisionanoj sukcesis verki mallongan raporton, kiu ricevis la unuaniman aprobon kaj kiun la Komitato aprobis en la lasta kunsido. TEJO restos, kio esence ĝi estas : internacia renkontiĝejo por gejunuloj; sed bazita sur la Deklaracio ĝi ankaŭ malfermos la diskutojn pri kiuj ajn problemoj, kiujn la nuntempa homaro devas alfronti; tamen, rilate la alprenon de difinitaj starpunktoj, rekomendoj aŭ aproboj, kiel internacia organizo, ĝi limigos sin al la kultura kaj lingva kampoj, lasante la Landajn Sekciojn agi kaj reagi en la senco, kiun ili mem opinias plej oportuna.

La spirito de Tyreso daŭre blovis en Graz. Ke la kongresoj fariĝis novstilaj, neniu povas dubi. Ni aŭdis tie vortojn nekutimajn, kaj ideoj esprimiĝis, kiam antaŭe ili devis sin kaŝi por ne ofendi la neŭtralecon de la aliulo.Okazis prelegoj, kiujn ni ne povis imagi antaŭ nur du jaroj, post ili ekestis diskuto, ofte vigla.

Ŝajnas, ke oni anstataŭis la antaŭan neŭtralecon, tute pasivan kaj sinoniman al blindeco, per alia pli aktiva kaj signifanta emo al reciproka klerigo.) La filozofoj de la 18a jarcento, por klarigi tiun fakton, uzis vorton, kies senco perdiĝis de tiam, la vorton toleremo. Toleremo estis la unua ŝtupo kondukanta al vekado de la intelekto.

Certe ĉion ĉi ni retrovis en Graz dank'al la Deklaracio, ne al la vortoj, kiujn ĝi entenas - ĉar „vortoj estas nur vortoj"-, sed precize al la spirito, kiu ilin naskis. Bedaŭrinde ne ĉiuj partoprenintoj de la kongreso bone komprenas tiun novan orientiĝon. Eĉ inter tiuj, kiuj plenkonscie aprobas la Deklaracion, troviĝas multaj, kiuj daŭre konsideras la kongresojn nuraj amuzejoj kaj turismaj entreprenoj; certe ili estas tiaj, sed depost Tyreso ili estas pli ol tio. Ĉu ne necesos harmoniigi la mensojn de la partoprenontoj en niaj IJK kun la konsekvencoj de la Deklaracio ?

Unuvorte, oni povas esti por aŭ kontraŭ la Deklaracio, sed oni ne povas nei, ke ĝi signas ion no·

van, eksterkutiman. Ni emus, ĉi tie, raporti la dirojn de iama prezidanto de TEJO, Ivo Osibov, kiuj bedaŭrinde ne povis laŭvorte esti kaptitaj; tamen laŭsence li diris, ke la Deklaracio konsistas el unu tuto, ke oni ne rajtas preni apartan frazon aŭ vorton por ĝin reliefigi spite al la ceteraj kaj per tio devigi la aliajn fikse sekvi difinitan gvidlinion, ke tiu dokumento signas grandan paŝon antaŭen, pri kiu la nunaj gejunuloj ne povas bone konscii, ke certe ĝi ne estas la lasta vorto dirita en TEJO, sed ke ĝi estas mejloŝtono en la historia procezo de nia organizo.

Oni ne povas iri antaŭen ur svingante infanece logikaspektajn sloganojn; saĝo kaj prudento ankaŭ estas nepre bezonataj, por ke plej efika kaj celtrafa estu nia agado.

**Robert Lloancy**

---

# Anatomio de „klasbatalo" en la TEJO Kongreso

La 26a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Graz estis vere unika fenomeno en la historia evoluo de la junulara esperantista movado. Surbaze de la Deklaracio de Tyreso aperis situacio en IJK neniam antaŭe konata : du kongresanoj el Milano, Italio, apartenantaj al la „revolucia Esperanto-movado" stampis grandan parton de la kongreso per sia apero interne kaj ekstere de la kongresejo. Ekirante de ideologia vidpunkto, kiun oni normale nomas maŭismo, ili ŝokis la paceman, grandparte ankoraŭ indiferentan turisman popoleton de TEJO kaj finfine sukcesis establi veran fronton interne de la kongresanaro inter jenaj du grupoj : unue, granda plimulto, kiu kontraŭstaris la ideologiumadon kaj kriadon de la italaj „revoluciuloj", due, la italaj „revoluciuloj-maŭistoj" kun simpatiantaro de svedaj gejunuloj (parte absolutaj ne-esperantistoj) kaj de aliaj kongresanoj, sume entute ne pli ol 15 personoj.

La klasbatalo en la kongreso enhavis jenajn ŝtupojn :

1) Sendemanda suriro de la podio okaze de la inaŭguro kaj aprezo de la penso de k-do Maŭ.

2) Unu tagon poste: nokta entrepreno atentigi kaj revoluciigi la Graz-anaron per surŝmiro de „revoluciaj" frazoj al muroj de unu el la plej konservativaj kvartaloj de Graz (la frazojn : Vivu la mondrevolucio, vivu Esperanto; La angla ne, Esperanto jes, ktp., LKK devis postule de la kongreseja dommastro forigi per elspezo de 100 ŝil). Sekvo estas la apero de la polico, kiun LKK provas konvinki, ne aresti la italojn pro tio.

3) La 13a de aŭgusto, demonstracia marŝo al la ĉefplaco de Graz : Malgraŭ antaŭtaga promeso de la italaj „revoluciuloj" ne aperi antaŭ la vicurbestro kun ruĝaj flagoj („la vicurbestro nin ne interesas") ili tamen aliĝas al la demonstracio. Tio provokas franc-israelan Esperanto-barbulon al ĉantanĝo kontraŭ LKK :

„Se LKK permesas la partoprenon de la ruĝaj flagoj, mi mem entreprenos paŝojn kontraŭ ili". Kelkajn minutojn post tio li aperas ĉe la fino kaj sturmante en la vicojn de la „revoluciuloj" li forŝiras ruĝan flagon kaj detruas tabulon kun la priesperanta instrukcio de k-do Maŭ. Sub la „faŝisto, burĝo"-krioj kaj la apero de la polico nla barbulo estas forigita el la demonstracio por momento. La polico ofertas la areston de li. Tion la maŭistoj ne volas, sed protestas kontraŭ la malpermeso de la utiligo de siaj laŭtparoliloj, dum ili nomas la uzon de megafono fare de LKK-ano cele al ordigo de la marŝado silenta „tipa kolaboracio inter Metterniĥeca LKK kaj la polico".

4) Dum la Literatura Vespero sveda kongresano sub la pretektsto de prikongresa poemo protestas kontraŭ la rabo de la ruĝa flago kaj la „faŝismo en TEJO".

**Loka gazetaro ofte sensaciumis pri la Kongreso.**

**Krach bei Kongreß**

**Wirbel bei der Esperantisten-Jugend**

**Graz. — Explodierende Knallkörper, ein Mädchen, das in Ohnmacht fiel, und ein Hemd, das versengt wurde. Mit diesem Knalleffekt platzte am Wochenende eine Miß-Wahl der Teilnehmer des Weltkongresses der Esperanto-Jugend, die in Graz tagte.**

Es sollte eine „Miß Esperanto" gekürt werden. Doch dann gab es „ideologische" Differenzen. Italienische Jung-Maoisten warfen schließlich, um ihre Ablehnung der Miß-Wahl deutlich zu zeigen, die Knallkörper, sogenannte „Deutsche Kracher". Immerhin ersetzten die Knallkörper-Werfer das versengte Hemd, das einem Jugoslawen gehörte. Schließlich kam auch die Grazer Polizei. Die Maoisten wurden nach einer Petition vom Vorstand der Esperanto-Jugend aus dem Saal geworfen.

Beobachter erklärten, daß sich ideologische Differenzen schon seit einigen Tagen unter den Kongreßteilnehmern bemerkbar gemacht hätten. Zu Auseinandersetzungen war es gelegentlich gekommen.

5) TEJO-balo : Kiam LKK-ano Miĉjo anoncas la elektiĝon de „Fraŭlino" Esperanto, leviĝas la jam bone konataj voĉoj STULTAĴO, STULTAĴO. Sekve de tio okazis voĉdono pri la aranĝo de fraŭlinelekto kaj la nombro de poruloj superas la nombron de neuloj je 100%, do la elekto okazas. Dum la balo, kiel cetere dum la tuta kongreso, la „Maŭ-revoluciuloj" pendigas murafiŝon, kiu grave akuzas LKK kaj TEJO-estraron, speciale ties prezidanton, pro kontraŭrevolucia agado kaj kunlaboro kun burĝaro. Dume ili (tamen nekomplete) sidas kaj kolermiene fiksas la partoprenantojn de burĝa amuzo (=danco). Iom antaŭ la noktmezo la rezulto de la voĉdono konatas : la portantinoj de la plej multaj voĉoj estas : „revolucio" (Maŭsimpatiantoj parte „helpis" kolekti la voĉdonilojn), f-ino Staniĉic kaj f-ino Kovacs.
F-ino „revolucio" propra iniciate nomas sin f-ino Ackermann, prezidantino de Svisa Esperanto-Junularo. Post la kutima ekzameno pri Esperanto f-ino Staniĉic estas proklamita Fraŭlino Esperanto 1970. Subite aŭdiĝas fortega bombeksplodo, kaj ankoraŭ unu. La amaso de la dancantoj ariĝas ĉirkaŭ la loko, kie la italaj „revoluciuloj" eksplodigis la du bombetojn, kies sekvo estis ŝoko de juna japanino kaj difekto de jugoslava ĉemizo.
La balo finiĝas, kaj unu el la revoluciaj internaciistoj el Milano surgrimpas la podion por komenci paroladon. Li ne sukcesas eldiri unu frazon, ĉar amaso da laŭtaj krioj kontraŭ li malebligas tion. La polico faras nenion, konsilas al LKK, reguligi ĉion interne.
6) La saman nokton : LKK surbaze de la eventoj kunsidas kaj konsideras la estraran decidon de TEJO pri forigo de la du italaj maŭistoj el la kongreso, same kiel la multajn minacojn el la kongreso, same kiel la multajn minacojn el la kongresanaro „mem entrepreni ion kontraŭ la maŭistoj", se LKK ne ekagas tiel. Post longa intertraktado akrega, la plimulto de LKK voĉdonas por eksigo de la menciitaj du personoj el la kongresejo. Sekve de tio la prezidanto kaj sekretario de LKK admonas ilin, forlasi la kongresejon, ĉar ili ne plu estas kongresanoj.



La Ĝenerala Sekretario de TEJO jam en Vieno malbonaŭguris per ŝerca uzo de orienta ventumilo. Poste en Graz ekblovis orientaj ventoj.

Tiu admono restas sen sekvo.
7) La tutan sekvan tagon regas fortaj diskutoj inter la kongresanoj pro la eventoj pasintaj. Unu el la kongresanoj iniciatas subskribokolekton por peticio, ke LKK eksigu finfine la du maŭistojn, „ĉar ni ne plu toleros iliajn militajn agojn kaj kriojn kontraŭ ni'", alikaze ili mem eksiĝus el la kongreso. La peticio akiras 80 subskribojn.
8) La maŭistoj montras jenajn formojn de diskuto : ili o.a. nomas la prezidanton de Socialisma Federacia Respubliko Jugoslavio „faŝisto" en diskuto kun jugoslaviaj gekongresanoj, kaj kraĉas antaŭ la nova Fraŭlino Esperanto titolante ŝin ankaŭ „faŝistino".
9) Dum la tuta tago (15a de aŭgusto) la „revoluciuloj" el Milano ne sekvas la ordonon pri foriro pro nuligo de kongresaneco. Vespere la amasoj de la kongresanoj grandparte fariĝas tre indignaj kontraŭ ili. LKK-anoj entreprenas la forigon de la aŭtomobilo de la „revoluciuloj", sekve de kio unu el ili ekkrias „Rabistoj, faŝistoj". Simile, en la **angla** lingvo protestas kelkaj svedaj kongresanoj. Tamen la aŭtomobilo poste fare de sia proprietulo estas kondukita eksteren. LKK-anoj transportas ankaŭ la valizojn de la milanaj Esperanto-revoluciuloj kune kun ili ekster la barokan pordon de la kongresejo. La pordo fermiĝas, kaj la eksigitoj sidas ekstere kaj intervjuiĝas fare de ĵurnalistoj.
Cetere la kongresejo ŝanĝis sian aspekton al militejo. Kongresanoj patroladas la tutan nokton por eviti ian supozatan „kulminan agon" de la ekskongresanoj. Sub tiaj cirkonstancoj la „milito-ludoj" de la „Subgrunda Vespero" fariĝas ridinde superfluaj, pro kio oni ne okazigas ĝin.
10) La psikozo de la interna fronto malaperas la postan tagon, kaj IJK estas kiel ĉe la 25 antaŭaj gaja kunestadejo de ĉarmaj knabinoj kaj knabetoj... La publiko tamen bone eksciis pri la „ejo de la revolucio" pere de la gazetoj, en kiuj la maŭistoj disponas elstaran lokon.

**H.M.M.**




**Pro la streĉigaj cirkonstancoj kiel por LKK tiel ankaŭ por la Estraro, ĉi tiu lasta en Graz apenaŭ trovis tempon por perdi la tradician fudbalkonkuron kontraŭ la teamo de la Landaj Sekcioj.**

**R. Cash :**

# Subgrunda semajno

Oni komisiis min raporti pri la subgrunda vespero, unu el la programeroj de la kongreso en Graz. Sed tion mi ne povas fari, ĉar ĝi ne okazis. Tial mi prenas sur min la taskon provi ekspliki unue, kial ĝi ne okazis, due, la sekvojn de tiu neokazo, kaj trie, miajn proprajn observojn, taksojn, kaj opiniojn pri la afero mem kaj pri ĝiaj sekvoj.
Tiu ĉi artikolo ne estas raporto, ĉar mi ne povas pretendi, ke ĉio skribita ĉi tie estas cent-procente objektiva. Pro tio mi preferas nomi ĝin komento. La komento celas ofendi neniun, sed mi timas, ke tio ne estas tute realigebla : ja temas pri serio da fuŝoj, kaj mi ne povas eviti mencii la fuŝintojn.
La unua demando estas, kial la subgrunda vespero ne okazis. Ŝajnas al mi, ke por tion ekspliki, necesas unue disigi la partoprenintojn laŭ tri grupoj : 1. la organizintoj kaj oficuloj; 2. la maŭistoj kaj simpatiantoj; 3. la grego. Tiaj dividoj ne povas esti hermetikaj, ĉar unu grupo ja reagas kontraŭ alia kaj sekve reagigas.
Ekde la komenco la kongresa organizado ne estis unuaranga. Malgraŭ multaj kaj grandiozaj promesoj, la afero montriĝis sufiĉe malbone organizita. Inter LKK kaj kongresanoj mankis komunikado, kaj ŝajne ĝi mankis ankaŭ inter la LKK-anoj. La Kongresa Libro estis bone farita (kvankam mankis adresaro de partoprenantoj), kaj la programo promesis riĉan kaj varian semajnon. Sed ekde la unua tago la programo suferis daŭrajn ŝanĝojn, kaj la komunika manko kaŭzis konstantan konfuzon. Unu bonega ideo far LKK estis aperigi ĉiutagan gazeteton kun i.a. sciigoj pri la ŝanĝita programo. Bedaŭrinde tiu gazeto ne aperis ĉiutage, kaj nur unufoje akurate; sekve ĝia distribuo estis neadekvata, ĝia efiko preskaŭ nula. La celo de la kongreso estis daŭrigi kaj plilaĝigi la diskuton komencitan pasintjare, speciale rilate la Deklaracion de Tyreso. Tiu ĉi celo ne estis atingita, ĉar nur unu vera diskuto okazis. Ankaŭ el la komitat- kaj komisionkunsidoj venis nenio grava. Krom elekto de nova estraro, nenio vere valora estiĝis de la kongresa laobro.
La sola novaĵo estis la maŭistoj. El preskaŭ ducent partoprenantoj la plej grandan efikon kaŭzis du membroj de maŭista klubo en Milano. Ili vendis ruĝajn bibliojn, pendigis afiŝojn, farbis revoluciajn frazojn sur murojn en la urbo, kaj ĝenerale agitis laŭ la maŭista maniero, per bruo, bombastaj diskutoj, kaj febra unuceleco.
Ilia celo ? Unuavide, ruĝigi la verdulojn. Ili ne ignoris la lingvan flankon, sed ili volis subordigi ĝin al la socia flanko. Ili volis revoluciigi TEJO, forigi la t.n. pozitivan neŭtralecon, maldekstrigi la Deklaracion de Tyreso.
Kaj LKK ilin ektimis. Tio estas la baza eraro far LKK, ke ĝi multe tro forte reagis. Sed al tio mi revenos poste nelonge.
La tria grupo estis la amaso da kongresanoj, kiuj venis al Graz ĉefe por ferii kaj amuziĝi. La Esperanto-movado similas al la cetera homaro per tio, ke fakte tre malgranda parto de ĝi estas efektive engaĝita. La plejmulto neniofaradas, nek por la homaro, nek por Esperanto. Ili uzas TEJO, samkiel la pliaĝuloj uzas UEA, kiel klubon, per kiu oni povas trovi amikojn, korespondi, vojaĝi, ktp. Do, ili ne venis por diskuti pri lernejoj, ili ne venis por helpi al TEJO trovi la ĝustan vojon inter la nuntempa junulara protesto. Ili venis por amuziĝi.
Ili kaptiĝis meze en la batalo intér la maŭistoj kaj la oficuloj, kaj reagis ŝafe.
Nun : kial la subgrunda vespero ne okazis ? La maŭistoj estis la katalizilo. Ili interrompis la inaŭguron per alvokoj al revolucio. Ili incitis LKKon kaj la estraron dum la cetere tute senvalora demonstracio en Graz; ili tiel kolerigis unu kongresanon, ke li detruis iliajn maŭistajn afiŝojn. Dum la balo ili aktive kontraŭis la elekton de F-ino Esperanto, agitis elektigi anstataŭe la revolucion, kaj fine ĵetis du bombetojn. La bombetoj kaŭzis bruon kaj fumon, kaj difektis la ĉemizon de unu persono, kiun la maŭistoj poste rifuzis rekompenci.
Unu kongresanino diris al mi, ke ŝi tiel kutimiĝis al Esperantaj aranĝoj, ke ŝi toleremas al ĉiuspecaj strangulaj. Bedaŭrinde, ke la plej multaj kongresanoj ne estis same toleremaj. Mi direktas tiujn vortojn speciale al LKK kaj la estraro, kiuj ekde la komenco konstante troreagis, traktante la maŭistojn kiel efektivan danĝeron. Ĉiufoje kiam la oficuloj troreagis, la maŭistoj plikuraĝiĝis kaj plisinpravigis.
Post kiam la bombetoj eksplodis en la balejo, LKK ĉesigis la balon, dirante, ke la situacio fariĝis tro danĝera. Jen la unua vere grava eraro, kiu efektive detruis la etoson de la kongreso. Kiam LKK publike konfesis sian timon, la grego ektimis. Restis nur ombro de kongreso.
LKK postulis al la maŭistoj, ke ili forlasu la kongreson; tion ili ne faris. LKK alvokis la policon, sed versajne la polico pli saĝis, ol LKK, kaj rifuzis interveni. Kiel diris la maŭistoj, pruviĝis, ke LKK estas pli faŝista, ol la polico. La maŭistoj gajnis nombron da simpatiantoj.
La postan tagon fruvespere, LKK decidis, laŭ konsilo de la polico, fizike elpeli la maŭistojn. Estis multe da bruo kaj ekscito, sed la maŭistoj ne rezistis, kaj estis elpelitaj. Sed ili restis tuj ekster la kongresa grundo en sia aŭto, kaj multe parolis kun la simpatiantoj.
LKK timis, ke la maŭistoj revenos dum la nokto kaj faros, laŭ la diro de unu estrarano, stultaĵojn. Do oni eĉ gardostaris. Neeblis okazigi la subgrundan vesperon. Sed vere, anstataŭe ni havis tutan subgrundan semajnon.
Mi ne malatentas la respondecon, kiun portis LKK por la sekuro de la kongresanoj. Sed ili troigis la danĝeron.
Kaj ankaŭ la maŭistoj troigis. Ili malatentis unu gravan fakton, kaj tio estas la baza signifo de TEJO. Ili ne povis, aŭ ne volis akcepti, ke TEJO estas organizo, kiu unuavice okupiĝas pri la lingva flanko de la tutmonda problemaro. Ili ankaŭ neglektis la fakton, ke TEJO ankoraŭ serĉas sian vojon el la mucida neŭtraleco, kiu tiel senefikigas la plenkreskulan movadon. Ignorante tiujn ecojn de TEJO, ili provis antaŭenpuŝi la propran ideologion. Kaj ili ne nur malsukcesis akceptigi siajn ideojn, sed preventis la progresan disvolviĝon de TEJO laŭ ĝiaj propraj kvalitoj.
TEJO ne povas esti revolucia organizo. Ĝi ne povas alpreni al si unu aŭ alian ekstreman ideologion. Laŭ mi, TEJO havas ununuran taskon : veki interesiĝon ĉe junularaj medioj pri la lingvoproblemo, kaj montri, ke Esperanto estas taŭga solvo de tiu problemo. Ĝi ne ignoru la aliajn, eĉ pli gravajn problemojn en la mondo. Sed ĝi konsciu, ke ĉiuj problemoj devas esti solvataj samtempe, ke babelo estas unu el tiuj problemoj, ankaŭ solvenda.
Oni ne povas solvi la lingvoproblemon hisante ruĝan flagon (nek verdan !).
Ĉiuj homoj, kiuj partoprenis la 26an IJKon kulpas, ke ĝi estis malsukceso. La maŭistoj kulpas, ĉar ili ne interesiĝis pri tio, kio efektive estas TEJO, sed nur pri tio, kion ili volis fari al ĝi. LKK kaj la estraro kulpas, ĉar ili ektimis kaŭ nula. La celo de la kongreso ests daŭrigi kaj plilarĝigi ĝi ne sufiĉe interesiĝis pri la kongresaj diskutoj kaj laboroj.





# FILMO: Post „Z" - La Konfeso

„Lenin vekiĝu, ili freneziĝis." Dum sovetaj tankoj brue invadas la stratojn de Prago, ĉeĥaj junuloj pentras tiun senhelpan proteston sur domomuroj. Fino de revo en Prago koincidas kun la fino de filmo, kiu jam antaŭ sia publikigo provokis akrajn disputojn: „La Konfeso". De post la filmo „Z", pritraktanta la mortigon de la greka politikisto Lambrakis, estis konate, ke la reĝisoro Costa Gavras ne timas politikajn provokojn. Nun denove evidentiĝas, ke la sukceso de „Z" ne estis hazarda. Kaj same kiel „Z", „La Konfeso" ĉefe parolas pri la sorto de unu viro.
Artur London estis depost sia junulaĝo membro de la komunista partio. Dum la Hispana Milito li batalis en internaciaj brigadoj, en Francio li aliĝis poste al la rezista movado kontraŭ la germana okupado, estis arestita kaj translokigita en la koncentrejon Mauthausen. En 1951 li fariĝis vicministro pri eksteraj aferoj de la ĉeĥoslovaka registaro. En la sama jaro li denove estis arestita per sekreta polico kaj kondamnita post 22-monata turmentado al vivdaŭra karcero pro „komploto kontraŭ la ŝtato". Dekunu samprocesanoj estis ekzekutitaj, inter ili la ĝenerala sekretario de la partio Slansky. Artur London postvivis, kaj en la jaro 1956 okazis lia rehonoriĝo. Liaj memuaroj liveras la aŭtentikan bazon de la filmo.
La aŭtoro de la tekstlibro J. Semprun („La milito estas finita") tial ĉefe fiksis la pason de la proceso: diabla procedo, kie senkulpulo. Per sistema detruo de sia personeco estas devigita al ‚konfesoj'. Ne unu psika aŭ korpa torturo mankas: malsato, batoj, soifo kaj ĉefe la plena izoleco de la ĉelo, kie baldaŭ ĉia sento pri tempo kaj spaco malaperas. Tipa sceno ekzemple estas: starante antaŭ la kortumo akuzito perdas sian tro vastan pantalonon kaj tuj la tuta tribunalo ekridegas. Grandan parton de la optike preskaŭ netolereble ŝoka efiko la filmo ŝuldas al la ĉefaktoro Yves Montand. Li tiel intense identiĝis kun la persono de London, do travivis dum la produktotagoj preskaŭ proprapersone la rolon, ke la degenero de la eleganta ministro al karcerulo n-ro 3225 fariĝas konvinka.
Certe ne estis la intenco de Gavras kaj Semprun produkti kontraŭkomunisman filmon. Ĝi ja kritikas kaj kondamnas la nehoman stalinisman komunismon, kaj London tiel komentas tiun aspekton: „La ŝoko kaŭzita per la filmo malfermas al multaj komunistoj la okulojn kaj helpos al ili liberiĝi de la terura mistika religieco, per kiu krimuloj fariĝis sanktuloj." Sed la ĝenerala temo estas la homo kiel viktimo de totalecaj sistemoj: la detruita individuo.
La filmo „Z" ricevis grandan aplaŭdon en Moskvo, en Ateno ĝi estis malpermesita. Ĉu „La Konfeso" nun ricevos inversan reeĥon? Costa Gavras mem respondas: „Tio ne trafus la kritikon de mia filmo. Kaj La Konfeso nur tiam aperos en la kinejoj de Ateno, kiam ankaŭ Z ricevos la permeson por publika prezentado en Greklando. Certe tio ne okazos."

**H.Z.**


---

# Plia atentigo

**VIKTIMOJ DE LA ATOMBOMBO. TRAVIVAĴOJ DE ATOMVUNDITOJ EN HIROŜIMA. TRADUKITA DE JUI ĈUNOŜIN. TOKIO 1968. 134 p.**

Nuna Japanio rigardas antaŭen, al plifortigo de la pozicioj ekonomia, teknika kaj politika en la mondo. Simbolo de tiu futuremo estis la monda foiro en Osaka, Expo '70. Tamen en tiu ĉi sama jaro la japana nacio (kaj kun ĝi la tuta mondo) devas ankaŭ rigardi malantaŭen, al la kruelega fino de la Dua Mondmilito: Antaŭ 25 jaroj eksplodis la atombomboj de Hiroŝima kaj Nagasaki.
Tiu eksplodo markis novan epokon de la homaro, la atoman, oni asertas. Ĉu la homaro povas fieri pri epokkomenco, kiun sekvis la plej terura kaj sensenca hom-buĉado, kiu iam okazis sur nia planedo? La homa naturo tendencas forgesi. Kaj tial estas bone, ke ĉiam denove estas homoj, kiuj provoke elvokas la memoron pri tiu plej nigra paĝo en la historio de Ter-Planedo.
Memorigi pri la hombuĉado en Hiroŝima estas la intenco de la libreto **Viktimoj de la Atombombo.** Tiu libro estas tute aŭtentika kaj objektiva raporto pri tio kio okazis al senkulpaj centmiloj da homoj. Oni ne povas esti ne turmentita rigardante la fotojn pri detruo de homaj korpoj kaj legante la doloregojn kaj suferojn de homaj vivoj.
Neniam plu okazu tia komplete diabla kaj satana katastrofo!
Sed - la gvidantoj de la grandaj ŝtatoj jam delonge forŝovis la tedajn pensojn pri kiel suferas la simplaj homoj dum tiuj „nepre necesaj" batalagoj. Jen antraŭ ni estas la fotoj de homoj nekredeble kruele vunditaj, ja ekstermitaj, kaj en la sama horo daŭras la cinika hombuĉado en Hindoĉinio. En 1945 mortis centmiloj da senkulpaj simplaj japanoj, kaj en 1970 mortadas dekmiloj da senkulpaj simplaj vjetnamanoj kaj kamboĝanoj.
Estas kaj restas la sama militisma-imperiisma kliko de Usono, kiu senhezite „oferas" nenombreblajn vivojn de neblankuloj (do malpli-valoraj homoj, ĉu ne?) por atingi siajn hegemoniajn celojn. Al ili akuze fingro-montris Ĉunoŝin JUI, kiu per sinbruligo oferis sian vivon por atentigi la mondon pri la senĉesa daŭrado de unu el la plej grandaj skandaloj en la historio de la gento **homo sapiens.**

**Toru Masaki**



# LATIN-AMERIKO

## - La homo, la tomato, la sifiliso, la mizero, la koloniismo

Antaŭ kelkaj monatoj mi flugis de Eŭropo al Sudameriko, per aviadilo en 20 horoj de Parizo al Santiago. Antaŭ 15.000 jaroj homoj venis de Azio, transiris Bering-straton kaj tra Alasko okupis iom post iom (=dum miloj da jaroj) la misteran kontinenton, kiun la hispanaj conquistadores (konkerantoj) nomis AMERICA.
Kio okazis dum tiuj 15.000 jaroj estas la rava aventuro de homa evoluo. Ni konsciu: la praamerikanoj venis kun malplenaj manoj al Ameriko, kaj ĉio, kio estiĝis en Ameriko, ĝis la eŭropa imperiismo kiel viruso envenis, estiĝis memstare.
La sola fenomeno, kiu samas en Eŭropo kaj Ameriko, estas la ekzisto de homo. Homo kun ĉiuj tiuj intelektaj fortoj, kiu ĉie montriĝas kiel homo per sia kapablo krei, ŝanĝi, transformi la mondon.
Mi vidis la gigantajn piramidojn de Teotihuacan (Meksiko), kies ideo similas al la egiptaj piramidoj, mi vidis la skribaĵojn de la majaa kulturo, kies scienca kapablo en multaj rilatoj almenaŭ egalas al tiu de la eŭropaj samtempuloj. Mi eksciis pri la fakto, ke la aztekoj transdonis al ni eŭropanoj la tomaton kaj la maizon. Sed mi eksciis ankaŭ, ke tiu „transdono" okazis sub cirkonstancoj, kiujn mi volas nomi unu el la plej grandaj tragedioj de la homo. Kaj tiu tragedio ankoraŭ ne finiĝis en nia tempo, sed daŭras kaj estas unu el la kreskantaj mondaj problemoj.
Pri kiu tragedio temas?
Temas pri tio, ke „delegitoj" de eŭropa civilizo (ĉefe hispanoj) venis al Ameriko por preni : oron, arĝenton, juvelojn, la tomaton, la maizon, sed ankaŭ la sifilison (kiun la koloniistoj post importo al Eŭropo tuj reeksportis al Hindio, cetere). Ili ne prenis la riĉecon de la „indiĝena" kulturo, sed detruis (obeemaj al papa ordono) sisteme ĉiujn religiajn, kulturajn kreaĵojn de la amerikaj kulturoj, tiel ke ni hodiaŭ apenaŭ povas aprezi ilin, escepte tiujn, kiujn la hispanoj ne trovis (ekz. la montaran urbon Maĉu Piĉu en Peruo).
Du branĉoj de homa evoluo ne povis unuiĝi, sed ambaŭ interbatalis, kaj en kaŝa formo ankoraŭ hodiaŭ konfliktas. Estas por ni eŭropanoj mirinda ekkono, ke ĝuste la religiemo de la praamerikanoj estis la kaŭzo por la ĉiaspeca malvenko kontraŭ la areto de senskrupulaj aŭropaj aventuristoj. Temas pri religiemo, kiun ni eŭropanoj kutime supraĵe nomas superstiĉo. Ĉio, kio estis, fontis el la adoro kaj gloro de la Dioj, kaj ni miras pri la grandego de la religiaj partoj de la urboj kompare al la malgrandeco de la profanaj partoj.
La ĉevaloj de la hispanoj fortimigis la trupojn de la aztekestro Montetekcuma, ĉar ili - nekonataj - estis diecaj estaĵoj por ili. La spurojn de la sama baza sopiro al la mistero kaj mistikismo ni vidas hodiaŭ en la fakto, ke spiritismo havas sian mondan centron en Brazilo (parenteze : ekzistas Brazila Spiritisma Esperanto-Junularo) kaj ke la plej grandnombraj anoncoj pri vido de flugantaj teleroj venas el Latinameriko (en Meksiko la ĵurnalisto de televidkompanio, kiu intervjuis min kune kun la Meksika Esperanto-junularo, donacis al mi surdiskan „dokumentadon" pri la aperado de flugantaj teleroj).
Nature, hispanoj transplantis la romian religion al la popoloj de Latinameriko. Sed ankoraŭ estas multaj originaj trajtoj en la kulto nuntempa, kaj estas ofte rekta simbiozo de paganismo kaj katolikismo.
La konkerintoj donis simplan solvon al la lingva problemo en Latinameriko. Hodiaŭ estas ĉie parolata la hispana lingvo. Nur en Brazilo 90 milionoj da brazilanoj parolas la portugalan, kiu ofte estas komprenata kontentige flanke de la hispanparolantoj. La politika imperiismo de la koloniistaj hispanoj montriĝis ankaŭ kultura kaj speciale LINGVA IMPERIISMO. Estas nur unu escepto. kiu eliras la kadron de bruta imperiismo. Kaj tiu estas la iama jezuita ŝtato hodiaŭ nomata Paragvajo. La indiĝena lingvo Gvarani estis la sola ame-

rika lingvo, kiu estis akceptita kaj flegata kaj skribigita flanke de eŭropaj enmigrintoj. Dank' al tiu izolita humanisma laboro la indiĝena lingvo Gvarani havas hodiaŭ preskaŭ la saman civilizan rangon kiel la hispana en Paragvajo (televido, gazetoj ktp).

Ni ne miru, ke ankoraŭ hodiaŭ sentiĝas, ke hispana lingvo estas koloniista, fremda lingvo en Sudameriko. Revoluciaj grupoj portas preskaŭ ĉiam nomojn el indiĝenaj lingvoj (ekzemple la kunbatalantoj de Che Guevara, aŭ la „Tupamaros" en Urugvajo).


Dua ondo de koloniismo en nia jarcento inundas la latinamerikan kontinenton, kaj tiu estas la potenco de la usona politiko, ekonomio kaj civilizo. Sur la restaĵoj de la bankrotiĝinta hispana imperiismo leviĝas la fruktoj de la usona kapitalismo. Kaj tiu usona kapitalismo havas ĉefe unu celon : akiri plej eble grandan profiton el ĉiuj faritaj investoj. Usona aktivado ne celas ŝanĝi la socion, usona mastrumado celas, eligi el la aktualaj situacioj kiel eble plej grandan profiton. Kaj tio eblas nur, se Usono kunlaboras kun la regantaj klikoj, kiuj kontraŭstaras la interesojn de la giganta proletaro.

Reganta „kremo" kaj servuta proletaro, tiun paradigme simplan duklasan socion postlasis la hispana imperiismo, kaj la usona aglo ĝin konservas kaj pro tio pliakrigas konstante.

Drastaj ciferoj el raporto de CEPAL (Komisiono Ekonomia Por Ameriko Latina) : 5% de la latinamerikanoj gajnas 31% de la tuta enspezo, 50% perlaboras 13% ! Kvar simplaj ciferoj pli ol ĉio alia dokumentas la socian maljustecon en kontinento, kiun enloĝas 300 milionoj da homoj. La kreskanta mizeriĝo evidentiĝas el alia cifero de CEPAL : En la lastaj dek jaroj la proporcio de la



- Sinjoro, ĉu via maldekstra mano scias kion faras via dekstra ?



kamparanoj malaltiĝis je 20%. Sed tiu foriro de la kamparanoj en la urbojn ne korespondas kun kresko de la laboristaro. Sekve, tiuj 20% konsistigas daŭre kreskantan mizerularon, kiu vivas sub neimageblaj, nehomaj cirkonstancoj en koncernaj kvartaloj, kiuj estas fame konataj ĉe la metropoloj, kiel ekz. Rio de Janeiro, Buenos Aires, Lima ktp. Kvankam la vojaĝagentejoj provas eviti la mizerkvartalojn, kiel mi rimarkis kelkfoje, ili apenaŭ kapablas tion, ĉar tro granda estas la amplekso de tiuj. Dume la kremo loĝas sub same neimagebla lukso. Lukso, kiu estas rekte provoka, kvazaŭ ĝi volas demonstri al la servuloj, kie estas la sinjoroj kaj mastroj.

„El patron" (mastro), latifundioj, jen la karaktero de la latinamerikaj kamparoj, de la amerika socio. Kaj bedaŭrindas konstati, ke la multaj eŭropaj enmigrintoj NENION FARIS por plibonigi la hispandevenan socistrukturon. Kontraste, ankaŭ angloj, germanoj, jugoslavoj apartenigis sin al la kliko de la superuloj kaj ne provis realigi tion, kion la geniulo Alexander von Humboldt (naturesploristo) jam antaŭ 150 jaroj postulis vidante la socian situacion de Latinameriko :

„Ĉio dependas de tio, ĉu eŭropaj enmigrintoj kaj amerikanoj sukcesos kunfandiĝi, krei homogenan socion sen internaj abismoj."

Ĝis nun ekzistas abismo, kaj la eŭropdevena influo (rekta aŭ perusona) ne kapablas, plej ofte NE EMAS plenigi kaj forigi tiun abismon.


La cirkonstancoj krias al REVOLUCIO, kaj la interna politiko, kiel konate, fariĝas konstante pli maltrankvila.

Unu revolucio okazis (Kubo), ĉu aliaj sekvos ? Aŭ ĉu Latinameriko restos sub la katenaj fortoj de imperiismo, koloniismo, aventurismo, kies rezulto estas la detruo de homaj libereco, forto kaj feliĉo ? Ĉu la evoluo de Latinameriko estos daŭre klasbatalo, kiu metas klasan intereson plej alte, aŭ ĉu estas fortoj, kiuj kreos novan socion, justan socion sen klasbatala detruo, per konscia forigo de praaj sociaj strukturoj ?

**H. M. Maitzen**

# Luno - nur strategia punkto?

Sendube : ke 500 milionoj da homoj en la tuta mondo samtempe povis observi la futbal-ludojn de la mondĉampionado en Meksiko lastan someron estas sekvo de la astronaŭtiko. Kvankam mi persone ne povas aserti, ke tiu fakto estas pravigo de la astronaŭtiko aŭ eĉ nur avantaĝo - tutcerte ekzistas multaj aferoj, ĉefe kompreneble teknikaj, kiuj estas valoraj apudproduktaĵoj de la klopodado de la homaro - t.e. de kelkaj teknikistoj kaj sciencistoj en du grandaj potencaj ŝtatoj - surluniĝi. De novaj materialoj por ĉiutagaj objektoj ĝis tute novaj inventaĵoj de altevoluinta



teknologio, tiu klopodado donacis al ni valoraĵojn, kiujn eble alie ni neniam aŭ ne tiel rapide havus. Sed ankaŭ tion mi ankoraŭ ne akceptas kiel pravigon de la miliardaj sumoj, kiujn oni elspezis jam (kaj elspezos ankoraŭ) por tiu strebado al aliaj astroj. Ĉar laŭ mia konvinko la unua kaj ĉefa kaj nefordisputebla tasko de ĉiu individuo kaj la tuta homaro estas : fari ĉi tiun teron tia, ke ni homoj povas home vivi sur ĝi. Kaj kiu kuraĝas aŭ arogus aserti, ke eĉ nur iomete ni jam plenumis tiun taskon, se la plej granda parto de la homaro vivas en mizero, malsato, milito ? Kio do ne kontribuas al la plenumo de ĉi tiu tasko, logike, estas misago. Kaj ĉu la spacveturaj entreprenoj kontribuis al ĉi tiu tasko ?

Ne. Ĉar male, kiel ajn oni provas vuali kaj kaŝi tion, la spac-aventuroj ne estas pac-ekspedicioj ! Se per satelitoj ni povas samtempe televidi futbal-ludon en la tuta mondo, tio eble estas paca afero. Sed se apud tiuj malmultaj „pacaj" staelitoj ĉirkaŭrapidas nian terglobon multaj aliaj kun tute alia celo, tio ne nur pensigas, sed entute ni devas vidi la impulsojn : satelitojn oni ne inventis unuavice por sciencaj kaj teknikaj progresoj (ekz. pli facila telefonado interkontinenta), sed tutklare por militistaj celoj : ili observu la „malamikon" aŭ eĉ „malamikojn". Kaj raketojn, kiuj suprenlevas tiujn satelitojn, oni ne inventis kaj konstruas pro la bela aspekto, sed por ĵeti kaj pafi per tiuj raketoj bombojn, ordinarajn kaj atomajn. Hitler esperis - feliĉe montriĝis iluzio, ĉar la tempo ne sufiĉis - per raketoj gajni tiun teruran mondmiliton, kiun li bruligis.

Certe, per la „malgranda paŝo de homo, kiu estis granda paŝo de la homaro", Usono havis la eblecojn, porti al la tero kelkajn rarajn kaj por kelkaj sciencistoj interesajn ŝtonojn de la luno. Sed dum la gazetaro tutmonda emfaze priskribis ĉi tiun gigantan progreson, simboliĝintan en kelkaj senkulpaj ŝtonoj, la sama gazetaro silentis pri la vera celo de tiu lun-ekspedicio : Oni nur raportis i.a. ke la „lunaŭtoj" starigis sur nia najbara astro iun Laser-aparaton, sed preskaŭ neniu ion diris, por kiu celo, kiun funkcion ĝi havas. Tial ŝajnas al mi bone, foje tute klare montri per tiu ekzemplo, ke la motivoj por la tuta spac-veturado unuavice kaj fundamente estas militistaj, strategiaj. Dum la ĝisnunaj raketoj estis direktitaj per „datoj" (por kio la evoluigo de komputiloj estis antaŭkondiĉo), kiujn oni povis havigi per teraj mezuradoj, tio ne plu validas por satelitoj.

La surluniĝo do servas al pure militistaj, pli konkrete al la solvo de balistikaj aŭ „navigaciaj" problemoj. Iom simpliga klarigo: Kiu el veturanta aŭtomobilo volas mortpafi kurantan leporon, devas treege precize kalkuli distancon kaj rapidecon, por trafi la celon. La precizeco de ĉiu konvencia distanc-mezurado dependas de la disponebla bazo. Por la rapideco kaj la distanco de la satelitoj la tera bazo ne sufiĉas. Celo de la surluniĝo do estas sole la instalado de Laser-reflektilo, per kiu oni povas sufiĉe precize direkti hidrogen-bombajn satelitojn. La lunaŭtoj do estas nenio alia ol instalistoj. . . .

Tiu unu ekzemplo sufiĉu por malkovri la verajn motivojn de la spacveturado, kiun oni - precipe post la unua surluniĝo - tiel patose festis kiel gigantan progreson de la homaro. Certe ĝi estas giganta progreso, sed nur por la militistoj, por la generaloj. Ĝi ne estas la plenumo de homara revo, sed ĝi servas nur al la fosado de la tuthomara tombo. La lunŝtonerojn oni nur bezonas, por ŝuti mondvaste sablon en la okulojn de la homaro. Tiu

homaro, kiu ŝajne jam tiel degeneris, ke tiel gigantajn klopodojn kaj strebojn ĝi direktas ne al la plibonigo de la propra vivo, sed de la propra morto. Tial mi, kiom ajn mi admiras la lunaŭtojn kaj ilian kuraĝon, nur povas miregi pri la teruraj mensogoj kaj trompoj, per kiuj oni ĉirkaŭvolvas la tutan entreprenon por neniigi la homaron kaj la loĝatan de ĝi terglobon.
Certe, ankaŭ mi forte esperas, ke neniam okazos tiu ebla katastrofo, sed mi simple ne povas akcepti, ke entute oni faras tion kaj krome eĉ volas kaŝi kaj la motivojn kaj la faktojn. Ju pli bone ni ĉiuj scias veron pri tiuj aferoj, des pli malgranda estos la danĝero, ke iu frenezulo estigas la katastrofon. Tial, laŭ mia opinio, ni ne sufiĉe laŭte povas krii: la luno ne estas idilia loko, kie oni trovas interesajn ŝtonojn, sed ĝi estas por la potenculoj nur strategia punkto en la spacmalpaco.

**Stefan Maul**

# KRIMAJ KROMOSOMOJ

La „krimaj kromosomoj" fantomas tra la gazetaro. Ek de kiam advokatoj legis en medicinaj revuoj, ke la kombinaĵo de kromosomoj XYY kreas inklinon al krimaj agoj, jam plurfoje en murdprocesoj defendistoj provis savi siajn klientojn per analizo de la kromosoma bildo. Kvankam ĝis nun tiaj argumentoj apenaŭ estis sukcesplenaj, tamen restas la fakto : la influo de heredaj genetikaj informoj al la karaktera evoluo de homo povas ludi tiel fortan rolon, ke certaj genetikaj difektoj igas homon krimulo.
Ĝuste ne preciza transdono de la genetikaj informoj, do certa mistrafo de la viva naturo, ŝajne estas la motoro, kiu evoluigas almenaŭ la mondon de la organismoj. Nur etaj genetikaj diferencoj - kaj tiel ankaŭ eraraj evoluoj - kreis dum milionoj da jaroj sub difinitaj kondiĉoj homon, kiu scipovas pli ol ĵeti per bastonoj al bestoj. La plej multaj genetikaj novkreiĝoj evidentiĝas nur dum ekstremaj situacioj, ekz. unu homo pli bone vidas, pli bone toleras malsaton aŭ malvarmon ol aliaj. Por prahomoj tiaj kapablodiferencoj certe estis vivdecidaj.
La plej gravaj modifoj okazas en la genoj, tial do en la kromosomoj, kie la genoj sinsekvas en tute difinita, molekule rekonebla ordo. Tiel jam ekzistas preskaŭ kompletaj „kromosomokartoj", kiuj respegulas kaj la korpajn ecojn (ekz. koloro de okuloj) en geno kaj la sinsekvon de la genoj en la kromosomo.



**La 25-jara usonano Richard Speck estis kondamnita pro la murdo de ok flegistinoj. Kiu kulpas - li aŭ, eble kromosomoj ? !**

Precipe per la „duraj" kosmaj radioj nun ekestas mutacioj, kaj la ŝanco de tia mutacio estas pli ol 10.000 : 1 por malpliboniĝo de la sistemo. Tamen ekzistas iu limo, ĝis kiu mutacioj estas relative sendanĝeraj. La kaŭzo estas (verŝajne) la duobla naturo de la DNA - molekulo (Desoksiribonukleinacido), do de la „kromosoma briko".
La homo havas en sia ĉelo 22 „normalajn" kromosomojn, kaj ĉiujn duoble, do 44. Krome ankaŭ ekzistas du kromosomoj determinantaj la sekson, nomataj XY ĉe viro, XX ĉe virino. Kiam nun unuiĝas ina ovo kaj vira spermo, kiuj nur havas la duonan nombron da kromosomoj, povas ekesti misformoj. sompartoj povas derompiĝi aŭ Kromosompartoj povas derompiĝi aŭ kromosomo povas eĉ manki. Manko de „normala" kromosomo, nomata aŭtosomo, malebligas plian evoluon. Ĝis nun nur unu infano estas konata, kies aŭtosomoj ne estis plennombraj. Sed mankanta kromosomo X aŭ Y ne nepre signifas finon de estonta vivkapablo. Eĉ pli ofte okazas troo da tiaj kromosomoj, tiel ekzistas homoj de la tipo XXXXY.
En la kazo de la „krimaj kromosomoj" nun la vira kromosomo Y estas submetita al la erara evoluo de duobliĝo. Viro de tipo XYY okulfrapas ne nur per speciala korpa grandeco, sed ofte ankaŭ per agresa sinteno, precipe per seksaj agresoj. Aliaj ofte konstateblaj komunaj karakterizaĵoj estas akno, do haŭtmalsano, kelkfoje ankaŭ malforta idioteco en kombino kun forta psika kripliĝo. Usonaj sciencistoj nun el individuaj esploroj konkludis, ke unu el 300 viroj devus havi tiun heredan difekton. Kaj laŭ tiu aserto vivus en Usono ĉirkaŭ 350.000 viroj probable havantaj kontraŭsociajn trajtojn.
Sed la konkludo, ke tiuj viroj estas destinitaj krimuloj, estas tro frua. Tiuj tipoj estas ja relative oftaj inter mense malfortaj kaj korpe grandaj krimuloj, sed multaj viroj havantaj la saman kromosom-eraron neniam pruvis tiajn inklinojn. Do en la kazo de la XYY-murdistoj necesas ĉiufoja esploro, ĉu la viro fakte estis tiel mensmalforta, ke li ne kapablis antaŭvidi la sekvojn de sia krimo. La homo fine estas estaĵo, kiu vivas laŭ tradicioj ricevitaj per edukado. Kaj la komprenemo, ĉu certa sinteno malutilas al alia aŭ ne, estas ankaŭ posedaĵo de pli simplaj spiritoj.

**H.Z.**

# MOZAIKO

**Francema betono**
Belga parlamentano asertas, ke li eltrovis aparte malican diskriminacion de la flandra loĝantaro de Belgio. Traveturante per sia aŭto plurajn tunelojn de Bruselo, li rimarkis je sia konsterniĝo, ke la franclingvaj elsendoj de la radio estas en tunelo pli bone kompreneblaj ol la flandralingvaj. Tuj li plendis ĉe la ministerio pri nederlanda kulturo, kiu tamen sukcesis konstati nur, ke la elsendiloj estas egale fortaj kaj krome situas precize sur la lingvolimo. La brusela gazetaro intertempe konsilis, ke oni esploru, ĉu eble la betona ŝtalo en la tuneloj pli facile allasas francemajn ondojn ol flandrajn.




**Longhareco laŭkonstitucia**
Se viroj portas longajn harojn aŭ hirtajn barbojn, ili ekspluatas sian rajton pri libera opiniesprimo kaj sekve troviĝas sub konstitucia protekto. Esceptojn oni povas motivi nur per argumentoj pri sekureco ĉe la laborejo aŭ pri higieno. Per tia verdikto juĝisto en la kalifornia urbo San José pravigis du junulojn, al kiuj la ŝtato ĉesis pagi pro senlaboreco, dirante ke per sia harkostumo ili libervole limigis siajn ŝancojn sur la labormerkato. De sia labordonanto ili estis maldungitaj, ĉar ili rifuzis iri al frizisto.
Alia laboroficejo argumentis, ke ankaŭ inoj kun mallongegaj jupoj intence reduktas siajn dungoŝancojn. Ĝis nun tamen ankoraŭ neniu juĝejo devis trakti kazon, kiam junulinoj pro portado de minijupoj vane petas subvencion sekve de senlaboreco.

**Anasoj en kapitalismo**
D-ro orn. Grobian Gans nun submetis, sub la titolo „La Ducks", sian delonge atendatan verkon pri Donald kaj liaj parencoj. Al tiu ĉi studo decas honora loko sur la librobreto de ĉiu, kiu deziras fundamente informiĝi pri la funkcio de la anaso en la epoko de evoluinta kapitalismo. Gans pruvis per tiu ĉi sentima analizo, ke necesas cedi al li apartan lokon inter niaj pensuloj. Kiel apenaŭ iu alia, li senmaskigis la pensaron de filozofiemaj samtempanoj kiel latente ornitologian, ekz. kiam li deduktas la psikan ŝanceliĝemon de Donald el ties troa egoismo. Multon li reĝustigas. Kiu aliĝis al la erara tezo, ke la rabistoj de monŝrankoj praktikas kłasbatalon, devos revizii sian opinion kiel eble plej rapide. Kun frapa konvinkipovo D-ro Gans argumentas : „Ili (la rabistoj) tuj montriĝas etburĝaj krimuloj kun faŝistoidaj trajtoj, fiaskintaj metiistoj kredeble, kiuj volas doni al sia agado la ŝajnon de subfosa aktiveco". Unuvorte, per sia meritplena verko D-ro Gans faris pionIran laboron kaj plenigis longe senteblan breĉon. (La psikogramo de la anasoj de Walt Disney ĵus aperis en germana eldonejo, ĝis nun ĉefe konata pro siaj satiraj verkoj.

**Sistema agado laŭ UEA**
El la Informa Servo de UFA ni ekscias, ke, sekve de sistema agado en Brazilo, nun tie troviĝas 50 stratoj, kiuj havas la nomon „Esperanto" aŭ „Zamenhof". Komentis „Hungara Esperantisto". : „Sed ni volonte legus ankaŭ informojn, kiuj sciigas nin pri la restarigo de la simplaj homaj, civitanaj rajtoj, pri forigo de ĉiuspeca subpremo kaj kruelaĵoj, ĉu en Brazilo, ĉu en aliaj landoj".

**DIRIS dum la kongreso . . .**
. . . mau-kongresano itala, sennombre dum la tuta kongreso : Rabistoj, faŝistoj, burĝoj, meternihistoj, habsburgaj oficiroj !
. . . kongresano H.T., bagateligante la ŝokiĝon de japanino pro bombeksplodo : Tio okazas dum preskau ĉiu karnavala festo.
. . . partoprenanto aktiva en literatura vespero (preskau plorante) : Burĝaj rabistoj forŝiris la ruĝan flagon kaj malkaŝis sian veran vizaĝon.
. . . jurnalistino de Graza gazeto :
Se oni jam elektas temon REVOLUCIO, oni devas esti preta al tiaj okazajoj.
. . . LKK-ano post la unua tago de la kongreso : Mi jam mendis 7 litojn en la loka psikiatra kliniko por ni.
. . . LKK-vicprezidanto, rifuzante iri al la sonoranta telefono : Mi preferas ne doni mian nomon !
. . . oratoro dum la respektiva konkurso : TEJO estas ludejo por Maŭistoj kaj Simoneistoj.
. . . vicurbestro de Graz, vidante la disputojn inter Mauistoj kaj Simonet : Ne lasu impresiĝi vin de la ekstremuloj.
. . . fraŭlino Esperanto; konsiderante la revolucian ambienton de la elekto : Mi estas revolucia fraulino Esperanto.

**Kapwepwe**, vicprezidento de Zambio, anoncis, ke la angla estos nuligita kiel instruobjekto en la zambiaj lernejoj. „La angla lingvo estas veneno", li deklaris en eduka konferenco. „Instruado de la angla en lernejoj estas la plej sekura vojo por detrui la afrikan kulturon kaj personecon."

**Kaj cetere . . .**
„Je la fino la vicprez. de UEA S-ro Wensing substrekis ke Prof. D-ro Ivo Lapenna estas la plej universala esperantisto kiun nia movado konas : samtempe organizanto, oratoro, verkisto, juristo kaj viro de granda formato, kiu pilotis ankaŭ ĉi tiun kongreson tre lerte tra la tempestoj. Ni danku - diris la vicprezidanto S-ro Wensing - al tiu viro unuflanke insultata sed aliflanke laŭdata kaj adorata, kaj konsciu la vortojn de D-ro Chiussi : Se Lapenna ne ekzistus, ni devus eltrovi ĝin ! Sekvis himno." - Gazetara Servo, 55a UK Vieno, Bulteno n-ro 7.

**Vortaro**
**Esperanto por komencantoj**
telegrafo = for-estanta aristokrato
sireno = pozi ve reaganta reno
de italo
radio = egipta propaganda-dio
indiko = edzina svelteco
kavaliro = itala inflacio
kolbaso = grasa kantisto
koloro = dekoracio de kapitalistino
korano = adepto de profesoro
Chris Barnard
kosmetiko = etiko de astronaŭtoj
islamo = pasinta invalideco
kaliko = ŝrumpinta katoliko
kanoniko = katolika pafmajstro
kanzono = regiono proksima al
akvo
karavano = malbonŝanco de
amanto
inhalo = haremo
intesto = fianĉ-ekzameno

sief

**Ĝentilaj ŝtelistoj**
Reveninte de nokta promenado, geedza paro en la pola urbo Lublin trovis en sia loĝejo folieton, kiun postlasis ŝtelistoj : „Viaj infanoj detruis la loĝejon, ni pelis ilin en la litojn. La bankuvo abundis per akvo, ni fermis la kranon. Tiam ni liberigis la duonfrostiĝintan katon el la fridujo - ĝoju do pro tio, ke ankoraŭ ekzistas helpemaj ŝtelistoj."